

LA REGNO DE DIO

Enkonduko

La koncepto de regno jam fariĝis iom eksmoda, eĉ ne tute deca. Iuj reĝoj aŭ reĝinoj, kiuj restas en la nuna mondo ne fakte regas sian landon, jam fariĝinte nur iaj reprezentantoj sen vera potenco. Tamen la esenca difino de reĝo aŭ monarkio estas, ke ekzistas iu persono, kiu havas aŭtoritaton super iu popolo.

Ĉi tiu artikolo celas eltrovi tion, kion la Biblio diras pri la Regno de Dio. La Biblio priskribas Jesuon kiel la MESION (hebrea) aŭ KRISTON (greka). Ambaŭ vortoj signifas REĜON. Tial li devas esti reĝo de ia regno. Antaŭ li naskiĝis, la anĝelo diris al Maria: "*Diodonos al li la tronon de lia patro David*" (Lk. 1:32), kaj kio ajn Pilato intencis per la akuzo "*LA REĜO DE LA JUDOJ*", kiun li surskribis sur la kruco, li uzis la esprimon pro tio, ke Jesuo mem estis parolinta al li pri "*mia regno*" (Jo. 18:36). La ideo de iu ajn reĝo krom Cezaro en tiu Roma epoko evidente estis danĝere pli ol 'ne deca'!

Venu Via Regno

Kiom ajn malmulton la homoj scias pri la Biblio, se ili scias ion, la plimulto scias la 'Preĝo de la Sinjoro', kiu troviĝas en Mt.6:10-13. Tio estas konciza preĝo do supozeble ĉiu frazo gravas, sed kiom da homoj komprenas la signifon de "*Venu Via Regno*"?

Esplorante ĉi tiun temon, tuj evidentiĝas kiom multe la Biblio diras pri la Regno. Ĝi troviĝas sur preskaŭ ĉiu paĝo de la Nova Testamento iamaniere, ekz. *La Regno, La Regno de Dio, La Regno de la Ĉielo, La evangelio de la Regno*, kune kun aliaj esprimoj, kiuj rilatas, kiel "*reĝi*", "*regi*", "*trono*" k.t.p.

Se ni demandus iun homon 'kio estis la mesaĝo, kiun Jesuo predikis?' verŝajne tiu tute ĝuste respondus 'La evangelio'. Estas do rimarkinde, ke la unuan fojon kiam tiu vorto aperas estas en la frazo "*La evangelio de la Regno.*" (Mt.4:23) La unuaj vortoj de la mesaĝo de Jesuo, kiujn Mateo raportas estas "*Pentu, ĉar la regno de la ĉielo alproksimiĝas.*" (Mt.4:17)

Por ke ĉi tiu studo ne estu tro longa, ni limigos ĝin al la rakonto de Mateo pri la vortoj de Jesuo, kaj rigardos kiel tio ligiĝas kun profetaĵoj en la Malnova Testamento kaj en la Apokalipso.

Kio kaj Kie estas la Regno?

Kiam la disĉiploj demandis kial Jesuo parolis per paraboloj, li respondis, "*Al vi estas donite scii la misterojn (sekretojn) de la regno de la ĉielo, sed al ili ne estas donite.*" (Mt.13:10-11), kaj li elsendis ilin por diri al la popolo "*La regno de la ĉielo alproksimiĝas.*" (Mt.10:7)

Ni do, rigardu tiujn parabolojn de la regno:

<u>Parabolo</u>		<u>Signifo</u>
Mt.13:1-9	la semisto	predikado
13:24-30	la trudherboj	bonaj k. malbonaj homoj kreskante kune
13:31-32	la sinapa semeto	disvastiĝo de la evangelio (vera kaj malvera)
:33	fermentaĵo	" "
13:44	trezoro	la regno pli valoras ol ĉio
:45-46	perlo	" "
13:47-50	reto de fiŝoj	bonaj k. malbonaj estos apartigitaj
13:52	skribisto	nova k. malnova mesaĝo
18:23-35	ŝuldantoj	pardonado nepre necesas
20:1-16	laboristoj en vinberejo	nuntempa laboro por Dio
21:33-46	kultivistoj en vinberejo	nuntempa laboro por Dio; regno estos prenita for de la judaj regantoj
22:1-14	edziĝo-festo	la invititoj ne indaj; aliuloj invititaj
25:1-13	dek virgulinoj	atendante la revenon de Jesuo

Estas rimarkinde, ke ĉiuj, tiuj paraboloj temas pri la periodo dum kiu oni predikadas la evangelion; tio estas de la komenco de la laboro de Jesuo ĝis lia reveno. Sekvas, ke iusence la regno ekzistas nuntempe, dum restas okazo por eltrovi la mesaĝon kaj decidi ĉu oni volas akcepti ĝin.

Sed kion la judoj mem komprenis pri la regno? Ĉu ĝi estis por ili tute nova ideo, aŭ ĉu io simila iam ekzistis en ties historio?

Ni jam vidis, ke Jesuo komentis pri la kultivistoj en la vinberejo, ke *"la regno de Dio estos prenita for"* la judaj regantoj. La sola regno, kiun la judoj iam havis estis la regno de Izrael, do evidente Jesuo parolis pri tio. Konfirmo pri tio troviĝas en Ag.1:6 kie la disĉiploj demandis ĉu Jesuo tiutempe *"restartigas"* la regadon al Izrael. Rigardu lian respondon:-

"Ne apartenas al vi scii tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervis al Sia aŭtoritato" (v.7)

Rimarku, ke Jesuo ne kontraŭdiris siajn disĉiplojn; rimarku ankaŭ, ke ni ne estos diritaj kiam la regno venos. Datoj ne aperos en ĉi tiu studaĵo!

Estas klare, ke Dio elektis la Izraelidojn kiel sian popolon, sed kial la disĉiploj kredis, ke la regno, pri kiu Jesuo predikis vere estas la regno de Izrael? Jen kelkaj versoj el la Malnova Testamento:-

- Kiam Samuel maljuniĝis kaj la popoloj postulis reĝon, Dio diris *"Min ili forpuŝis de regado super ili."* (1Sam.8:7)

- David priskribis sian tronon kiel *"la trono de la regado de la Eternulo super Izrael."* (1Kron.28:5)

- Dio mem diris *"Mi estas la Eternulo, via Sanktulo, la Kreinto de Izrael, via Reĝo."* (Jes.43:15)

Tial estas evidente, ke pasintec ekzistis la regno de Dio kaj Dio mem estis la reĝo.

Ni revenu nun al Mateo por rigardi iujn aliajn dirojn de Jesuo pri la regno:-

- 16:28-17:8 La Aliformado.....antaŭa ekvido de la regno
- 18:1-4 "se vi ne.....fariĝos kiel infanoj, vi neniel eniros en la regnon..."
- 19:27-30 la disĉiploj juĝos la dek du tribojn de Izraelo
- 20:20-23 peto, ke Jakobo kaj Johano sidu ĉe Jesuo en la regno
- 24:1-30 profetaĵo sur la monto Olivarba:-
tempo de granda aflikto; evangelio estos predikata tra la tuta mondo; oni vidos la Filon de homo; anĝeloj kolektos la elektitojn.

Tiuj citaĵoj klare kondukas nin al la estonteco, kiam Jesuo revenos surteren. Iuj el la plej bone konataj profetaĵoj en la Malnova Testamento priskribas tiun estontan tempon, ekz.

".....Dio de la ĉielo starigos regnon, kiu neniam detruigĝos, kaj ĝia reĝado ne transiros al alia popolo; ĝi frakosas kaj detruos ĉiujn regnojn, sed ĝi mem staros eterne." (Dan.2:44)

"Iam en la tempo estonta la monto de la domo de la Eternulo staros kiel ĉefo inter la montoj, kaj ĝi estos pli alta ol ĉiuj altaĵoj; kaj fluos al ĝi ĉiuj nacioj. Kaj iros multaj popoloj, kaj diros: Venu, ni iru supren sur la monton de la Eternulo, al la domo de la Dio de Jakob, por ke Li instruu nin pri Siaj vojoj, kaj ni iru laŭ Lia irejo; ĉar el Cion eliros la instruo, kaj la vorto de la Eternulo el Jerusalemo. Kaj Li juĝos inter la nacioj, kaj Li decidos pri multaj popoloj; kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon." (Jes.2:2-4)

"....loĝos lupoj kun ŝafido, kaj leopardo kuŝos kun kaprido.....suĉinfano ludos super la truoj de aspido....oni ne malbonagos.....la tero estos.....plena de konado de la Eternulo..."(Jes.11:1-9)

"Ekĝojos la dezerto.....malkovriĝos la okuloj de la blinduloj....ĝojo eterna estos....."(Jes.35)

Ĉu ne la tuta homaro jam longe sopiris al tia mondo de paco kaj sufiĉo?

Ĉu "Utopio" estos teda?

Iuj homoj pensas, ke vivi por eterne en perfekta mondo sen ia okupo estus tre enuiga. Nu, sendube estus tedege se la eterna vivo estus nure senfina kontinuaĵo de ordinara vivo kiel ni nun spertas ĝin. Tamen la eterna vivo en la Regno vaste malsimilas al la nuna vivo. La homa menso jam ne estos limigita kiel nun; tiuj benatuloj, kiuj ricevos ĝin ĝuos tian bonan fizikan kaj intelektan vivon, kian Dio ĉiam intencis por ni. Niaj limigitaj mensoj eĉ ne povas komenci ekkompreni tion.

Por konstati ĉu ja estos nenia okupo, ni rigardu la profetaĵojn en la Nova Testamento, kiuj troviĝas ĉefe en la Apokalipso. Tio estas la informo, kiun Dio donis al Jesuo, por ke li sciigu al siaj servantoj "tion, kio devas baldaŭ okazi." (Apok.1:1)

Komence estas mesaĝoj al sep kristanaj eklezioj en Malgranda Azio, de "Jesuo Kristo la unuenaskita el la mortintoj, kaj la reganto de la reĝoj de la tero." (1:5), kaj la eklezioj estas

nomataj "regno, pastroj al lia Dio kaj Patro" (v.6). La ĝusta rolo de pastro estas prizorgi la popolon kaj instrui ilin pri Dio. La plejparto de la Apokalipso priskribas mirige kaj simbole la terurajn suferojn de la nekredanta mondo ĝis kaj je la reveno de Jesuo. Iufoje troviĝas ekvidoj de pli bonaj okazaĵoj, ekz.

"La regno de la mondo fariĝis regno de nia Sinjoro kaj de Lia Kristo; kaj li reĝos por ĉiam kaj eterne." (11:15)

Pli poste troviĝas priskribo de juĝado:-

"Kaj mi vidis tronojn, kaj oni sidis sur ili, kaj juĝo estis donita al ili; kaj mi vidis la animojn de la senkapigitaj pro la atesto de Jesuo kaj pro la vorto de Dio, kaj tiujn, kiuj ne adorkliniĝis al la besto, nek al ĝia bildo, kaj ne ricevis la markon sur sia frunto kaj sur sia mano; kaj ili vivis, kaj ili reĝis kun Kristo mil jarojn. La ceteraj mortintoj ne vivis, ĝis finiĝos la mil jarojn. Tio estas la unua releviĝo. Feliĉa kaj sankta estas la partoprenanto en la unua releviĝo; super tiuj la dua morto havas nenian aŭtoritaton; sed ili estos pastroj de Dio kaj de Kristo, kaj reĝos kun li mil jarojn." (20:4-6)

El tio ni konstatas gravajn punktojn:-

1. La 'pastroj' estas fidelaj homoj, kiuj jam releviĝis el la mortintoj
2. Ili jam ricevis senmortecon
3. Ili reĝos kun Kristo mil jarojn, (la vera jarmilo).

La bildo ĝis nun

- la Izraela nacio konsistigis la Regnon de Dio ĝis ili malakceptis sian reĝon, la Mesio
- la Regno de Dio nun havas Jesuon kiel reĝon, kaj ties civitanoj elsendadas la evangelion en la mondon, atendente lian revenon
- je sia reveno la reĝo relevos la mortintojn kaj juĝos ilin; la fideluloj regos la mondon kun li saĝe kaj juste
- tio estos tempo de paco neniam antaŭe konata en la mondo

Mil Jaroj de Kio?

Kiam Jakobo kaj Johano volis okupi la ĉefajn oficojn de aŭtoritato en la Regno (Mt.20:21), Jesuo devis ilin komprenigi, ke regi, juĝi kaj reĝi en sia Regno estos tute malsimile al la regado de la nuna mondo, kiun ili, (kaj ni), konas. Li ne admonis ilin pro tiu peto, nek la aliajn disĉiplojn pro ties indigno. Li diris:-

"Vi scias, ke la regantoj de la nacioj kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu via servisto; same kiel la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaçeton por multaj."(20:25-28)

Tio akordas al la rolo de pastro. Jesaja priskribas tian situacion en sia 2-a ĉapitro, kiun ni jam

rigardis, kie la nacioj iros al Jerusalemo por lerni la vojojn de la reĝo (v.2-6). La senmortaj servantoj de la reĝo dum tiu tempo havos la taskon instrui, prizorgi kaj servi la ceteron de la popolo por ke ankaŭ tiuj fariĝu fidelaj.

Tial ni povas konstati, ke oni regos tiun Regnon per bona ekzemplo kaj milda persvado, ne per perforta tiraneco. Dio neniam devigas homojn veni al li. Se ni volas partopreni la Regnon de Dio, sekvas, ke ni devas nun celi tiel kondukti, por ke ni fariĝu taŭgaj pastroj, kiel Petro skribis:-

".....vi ankaŭ, kiel ŝtonoj vivantaj, konstruiĝas domo spirita, sankta pastraro, por oferi spiritajn oferojn, akceptotajn de Dio per Jesuo Kristo." (1Pet.2:5)

Tiujn vortojn Petro skribis al ĉiuj fratoj kaj fratinoj, tial ni devas nun strebi esti kiel pastroj al ĉiuj por helpi ilin alproksimiĝi al Dio, tiel montrante Kriston en niaj vivoj.

Sed ĉi tiu periodo de la Regno ne daŭros por ĉiam; aferoj ankoraŭ ne perfektigis. La cetero de Apok.20 priskribas finan ribelon kontraŭ la reĝo je la fino de la 'mil jaroj'. Tio ŝajnas nekredbla, sed la homoj havas liberan volon, kaj kiel Paŭlo klarigis, Jesuo *".. devas reĝadi ĝis li metos ĉiujn malamikojn sub siajn piedojn."* (1Kor.15:25) Tiam la mondo estos plenigita de la agnosko de Dio kaj ĉio respegulos lian gloron. Paŭlo pli klarigas:-

"Poste venos la fino, kiam li transdonos la reĝecon al Dio, al la Patro; kiam li estos neniiginta ĉian regadon kaj ĉian aŭtoritaton kaj potencon. La lasta neniigota malamiko estas la morto. Ĉar: Ĉion Li metis sub liajn piedojn. Sed kiam estas dirate: Ĉio estas submetita, estas evidente, ke esceptita estas Tiu, kiu submetis ĉion al li. Kaj kiam ĉio estos submetita la li, tiam la Filo ankaŭ mem estos submetita al Tiu, kiu submetis ĉion al li, por ke Dio estu ĉio en ĉio" (1Kor.15:24-28)

Ni ne scias la signifon de tiu lasta frazo *"Dio estu ĉio en ĉio"*, verŝajne ni ne kapablas kompreni, sed Dio jam donis al ni priskribon de tiu estonteco, kiun ni povas ĝoje kompreni:-

"Jen la tabernaklo de Dio estas kun la homoj, kaj Li loĝos kun ili, kaj ili estos Liaj popoloj, kaj Dio mem estos kun ili kaj estos ilia Dio; kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis. Kaj diris la Sidanto sur la trono: Vidu, Mi faras ĉion nova tiuj vortoj estas fidelaj kaj veraj." (Apok.21:3-5)

